

Registered at G.P.O, Melbourne, for transmission by post as newspaper.



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 117 (Tenth Year)

Melburno (Melbourne), Australio. 10 Marto 1930.

BILL KING!

You've heard of the N.Z.E.A.,

And how its praises ring,

But do you know the dinkum truth

About a man named King?

He burns the midnight oil and works

Right through the dreamy night;

He does not care a tinker's curse—

He don't pay for the light!

He types and bangs night after night

While burglars elsewhere creep;

It does not trouble him at all

If other folks can't sleep!

He goes like mad—life is so short—

He acts like one obsessed.

He must have killed a Chinaman

For Bill King cannot rest!

He bangs the keys, the table creaks,

The houses sway and shake!

The police believe that he's the cause

Of Murchison's earthquake!

The mail comes to his house each day

Within a heavy sack;

Bill King just gives a hearty laugh

When postmen break their back!

When midnight sounds with shud-
dering clang

And ghosts in corners lurk

A devil enters into Bill—

The imp of Still More Work!

And when his head drops on his chest

And he begins to doze,

He pops dead matchsticks 'tween the
lids

So that his eyes won't close!

When Bill King dies and doctors come

To take a last X-ray

Upon his heart they'll find, I'm sure,

The sign "N.Z.E.A."

We're proud of our N.Z.E.A.,

We know it's going to win

Dominion-wide renown—because

Bill King is the king-pin!

B.P., Wellington.

1st Esperanto Congress,
18/1/30.

ELTIROJ EL "ORIGINALA VERKARO DE L.L. ZAMENHOF"

...En la fino ni devas diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri la financaj rimedoj de nia afero. Ili estas bedaŭrinde tre malgrandaj, kaj tio ĉi forte malrapidigas nian energian progresadon, por kio antaŭ ĉio estas necesa **mono, mono kaj mono**. Preskaŭ la tuta financa pezo de nia afero kuŝas nun sur la ŝultroj de unu oferema amiko, kiu kovras ĉiujn deficitojn. Ni petas la amikojn de nia afero pli forte subteni ĝin finance kaj peni altiri al ĝi **financajn fortulojn**....

(Prospekto, "La Esperantisto", 1893; O.V. 11. 67)

La plej malforta flanko de nia afero estas tio, ke ĝis nun ni ne havas ankoraŭ eĉ unu riĉan homon, kiu povus subteni nian aferon materiale. La tuta nia afero ĝis nun kuŝas sur la ŝultroj de personoj, kiuj havas bonan volon sed ligitajn manojn kaj neniujn rimedojn. Dume nia afero, por progresadi rapide, postulas grandajn rimedojn. Oni devus dissendi en la mondon grandan nombron da lernolibroj kaj agitantaj broŝuroj, oni devus donadi anoncojn, eldonadi verkojn k.c. Estas sendube, ke se ni havus materialajn rimedojn, nia afero irus cent fojojn pli rapide. Tial ni petas niajn amikojn peni, kiom ili nur povas, altiri **riĉulojn** al nia afero. Ankaŭ homoj kun konataj nomoj aŭ okupantaj gravajn situaciojn en la societo estas por nia afero tre gravaj; kvankam jam nun inter la amikoj de nia afero trovas sin kelkaj personoj tre altaj kaj influaj sed, pro kaŭzoj ne kompreneblaj al ni, ili bedaŭrinde sin ĝenas ankoraŭ ne sole fari ion publike por nia afero, sed eĉ elmeti malkaŝe sian nomon. La plej grandan utilon al nia afero alportos tiu, kiu

inklingos por ĝi iun riĉulon, kiu volus preni sur sin la tutan materialan flankon de nia afero. (Artikoletoj, "La Esperantisto," 1891).

.....Mi ne scias, kiaj estas viaj planoj por la estonteco, sed mi pensas ke antaŭ ĉio vi devas per ĉiuj fortoj peni fondi solidan kason, ĉar por sukcesoj en nia afero, tiel same kiel por milito, "estas necesaj tri objektoj; mono, mono, kaj mono."

REVUO DE REVUOJ de kribranta redaktisto.

Por interesi ne nur legantojn de alilandaj gazetoj sed ankaŭ la redaktistojn de tiuj, ni altiras atenton al jena takso. Ĉi tiu kritiko estas farita tute laŭ vidpunkto de homo serĉanta informojn pri Esp-a progreso kaj alispecajn represindaĵojn. Estas vere ke iuj malgrandaj gazetoj frape superas laŭ enhavoriĉo la amplekse pli imponajn.

Bonvenu al "Esperanto-Praktiko" pro ĝiaj valoraj lingvaj studoj. La eta "Socialisto" (Vieno) duone germanlingve verkita, enhavas en Esp-o trafajn traktojn pri lingvuzo, sed bedaŭre kun germanaj vortkomparoj, kio nebligas por ni represon. La "Litova Esperanto-Revuo," alte havinda nur pro sia kolumno de "Esp-o progresoj," elĉerpinda fonto sufiĉe ĝisdata. La belarte "Oomooto" eldonoj estas interesaj preskaŭ nur por tiuj ŝatantaj la kosmegan religipensadon. Notoj pri la kinofila mondo donas plezurajn momenton. "La Belga Esp-isto," netforme aperigata tute en Esp-o, enhavas ĉiam legindan literaturajn kaj reklamajn de laŭtnomaj firmoj. Svenska Esp. Tidningen kaj "Nagasaki Junularo" estas preskaŭ tute nacilingvaj, tial neutilaj por ni. Ĉu ne la estiminda red. de "Dordrechta (Dordrechta?) Esp-isto" iom kompaktigu sian cetera bravan organon urban? "La Pola Esp-isto" kalkulas inter siaj verkistoj bone konatajn nomulojn en nia movado. Respektinda legaĵo. "Arbeiter-Esperantist," germanlingva, portas suplemente "La Lernanton," sennaciecan sed simplastilan materialon por iomeprogresintaj. "Kataluna Esp-isto" supoze laŭ bontrovo ankaŭ aperas vestita preskaŭ tutkorpe per naci-idio. Same ĉe la trafe redaktata "L' Esperanto" de Italujo. "Orienta Revuo," impona, klare redaktata, ĉiam briligas la okulojn, sed post iom venas amara sento, ĉar ni sentas absolutan malpovon deĉifri ĉi vorteton el la sendube valoraj studoj japanlingve verkitaj. "La Verda Lumo," el Ŝanhaja E. Asocio, pleje hinlingva. "Hispana Esperanto," ŝat-

ata pro siaj librorocenzoj kaj Esp. mondinformoj, kvankam ĉi-lastaj estas ordinare iom neaktualigintaj. Poezio ornamas ofte ĝiajn paĝojn. Kelkfoje ni vidas en ĝiaj prozaĵoj solecismojn kaj neglatan stilon. La bonegaj "La Movado" kaj "Heroldo" kompreneble estas por ni ĉefaj fontoj de informo. "La Bulgara Esp-isto" kaj "La Progreso" povus pli brili.

Ni interŝanĝus "Austria Esp-isto," "La Nova Epoko," "Marto," "Paris-Esperanto," "La Rejna Stelo." (Red).

DU AMOJ.

(De Lord Alfred Douglas)

Dolĉa junulo malĝoja kaj ĝemanta, vi kial vagas ĉi belajn regnojn? Mi petas, diru vere vian nomon? Li diris: "Mia nomo—Amo." Jen tuj l' unua turnis sin al mi, "Mensogo," kriis, "Li nomigas Honto." "Mi estas amo; sola restis mi en ĉi ĝardeno bela, ĝis li venis kun trudo nokte. Mi estas vera Amo; plenigas mi per reciproka flamo la korojn de knabinoj kaj de knaboj." Ĝemante tiam diris la alia: "Laŭ via vol!" Mi estas tiu Amo, "kiu ne kuraĝas diri sian nomon."

El la Angla tradukis.—A. Delsudo.

HEROLDO DE ESPERANTO SEMAJNA—INTERNACIA SENDEPENDA

Informofonto nepre aktuala, interesa.

Rakontoj, artikoloj, ilustraĵoj

Abonprezo: 15 germ. rmk.

Ĝus komencis la pri-Australia romano

"Anstataŭa Edzino"

de Lilian Pyke

Petu specimenon! Brusseler str 94. Koln, Germanl.

ESPERANTO EN FILMARTO!!

"Paramount" ĵus faris novan serion da parol- kaj kantantaj filmoj en 13 lingvoj. Ĉiu estis unuope farita, en koncernata lingvo, kaj elmontras famajn geaktorojn kaj aliajn personojn el diversaj mondpartoj. Esperanton ankaŭ oni uzis en ĉi tiu peno liveri al ĉiuj popoloj filmojn en komprenataj lingvoj. La filmoj estas unu- kaj du-partaj, kaj lingvoj uzitaj estas hispana, portugala, angla, finna, Esperanto, franca, itala, rusa, japana, sveda, germana, ĉeĥoslovaka kaj kimra. (Film Weekly, Sydney, 30/2/30.)

TONGUE-TIED TALKIES.

Says the Musical News: "The talkies cannot remain international in the same sense as the dumb screen. Most of the world's darlings will for

the future, unless the old silent style of cinedrama continues to prevail—have to revert to the comparative obscurity of mere national darlings. Pola Negri will find herself more at home in a land that can understand her when she speaks. Gloria Swanson may be less congenial to the Czecho-Slovakians when she tries to tell them in words what the silent screen conveyed in brief texts. If the talkie is to become as international as the pantomimic play of the older cinema, either the early Esperantists will have to get terribly busy or the international language of music will bring us very soon to the definite stage of cineopera.... indeed...opera seems to be the one sure road for the talkies."

To those who regard as a foregone conclusion the acceptance by the world of English as the universal talkie language we would recommend a brief consideration of an enquiry opened by the Swedish newspaper "Dagens Nyheter" (Sept., 1929). Five Swedish language teachers, interviewed by the paper, strongly criticised the English of the talking films. Said Lector Erik Wellander: "My experience has taught me that of all European tongues English is the most difficult to comprehend, for its pronunciation is not clear. Both French and German are, in this relation, clearer than English. To make matters worse, the American dialect of the films, by reason of its extremely ear-baffling enunciation, directly hinders the progress of him who is trying to learn English."

Lector G. Lene (Stockholm) shares the opinion that the sound film is undoing the work of the teachers of English. "The talkie will give no help to the learner of English. Listening to "The Jazz Singer" I was compelled the whole time to sit with the program before my eyes, in order to understand anything of the spoken words. The American dialect used seems the bar to comprehension by foreign students of English, and I fear that its influence will be detrimental to such."

And Dr. Brilioth reminds us that the American dialect soundfilms have not succeeded even in England. The speech of Americans is constantly receding from standard English, and, in his opinion, it is only a question of time for the English language, as spoken on both sides of the Atlantic, to show the same degree of difference as is seen, for instance, between the

tongues of Sweden and Norway. In Sweden the talkie is enjoyed only by the few who have for years been fortunate in understanding spoken English; for the learner of that language it is of little use in its present stage, for the schools teach only the "King's English" of the educated Londoner."

In the judgment of many who have studied the principles governing language evolution, the phonetic simplicity of Esperanto is such that after some 40 years of international usage the danger of disintegration into dialects has assumed a position of relative remoteness. As a London writer in Dec. "International Language" testified: "I have spoken with Esperantists of more than forty nationalities, from Russians to Japanese, and Yankees to Finns, in all grades of proficiency, from the comparative beginner to the expert, and of all grades of education; and in every case I have understood them, and they me, with ease. The differences in vowels, consonants, rhythm and sentence construction were slight, and caused us no trouble. The second fact is that when a little time ago I went to an Esperanto Congress in Edinburgh, I had far more difficulty in understanding the English-speaking Scots than in understanding Esperantists from the ends of the earth. Esperanto is now being broadcast in nearly every European country, as well as Japan and U.S.A., and every broadcast is intelligible to the Esperantists everywhere."

This unity has been conserved by several factors, chief among which are (1) The essential simplicity of Esperanto itself; (2) The wise establishment of a language Committee, whose function it is to observe tendencies in the evolving tongue, to recommend usage calculated to ensure both unity and healthy expansion, to stamp as official those roots that general acceptance has already sanctioned; (3) Free circulation of international gazettes read from Kobe to Copenhagen; and (4) The consciousness on the part of all who speak Esperanto that simplicity and immediate comprehension form the one thing needful, a consciousness that keeps them ever on guard against the intrusion of national idioms.

Esperanto calmly awaits its undoubted trial at the "talkies"; its unchallenged successes in many another field have imparted to those who love it a confidence that will carry them to the full achievement of victory.

GVIDLIBRO PRI MONTECATINI KAJ REGIONO (ITALUJO).

Jen turista kaj komerca direktilo nedubinde valoro, dukolumne presita en itala kaj esperanto. Plena de reklamoj tiulokaj, kaj plenliste enhavanta adresojn de komercistoj, hoteloj k.c. la libreto 100-paĝa estas vere necesa por la tien-ironta esp-isto. La legaĵo tute ne estas seka, sed estas bonguste kompilita de iu amanta la historion de sia regiono kaj interesan rakonton.

Lingve oni misuzas inter aliaj "asiston" (helpon); novaj radikoj estas "fascino" (allogpovo), primeco, targo, preposta, ascendo, termolejo. Priokupi (sin).

Interesitoj sin turnu al A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italia. (Robo).

ICELAND AND ESPERANTO.

As an example of the utility of Esperanto at the International Labor Bureau, we cite the case of the Iceland Co-operatives. The Bureau had many times endeavored to get information concerning the co-operative movement in Iceland, but without result. In despair, the chief of the co-operative service at the Bureau sent a letter in Esperanto to the Universal Esperanto Association in Geneva, asking that it be forwarded to its delegate in Iceland.

The result was complete success, for a detailed statement on the Iceland co-operatives was received by the Bureau, which was gratified to announce the position in its current publications and to complete on this point that part of its year-book given to co-operative organisations.

This new development has led to the Bureau's printing in its Bulletin a regular Esperanto page on co-operative matters, and sending this to all those co-operatives with whom it is in contact. A fruitful correspondence has already resulted from this departure, for the service at the Bureau has at its disposal a rich array of informative matter received in this way.

And so, with growing official recognition, Esperanto functions as the instrument of international communication.

Translated from "l'Eclaireur de Nice."

YAKUTSK DEKTRI ! A Radio Problem.

It is common knowledge that the ever-growing number of radio stations is making their certain identification a matter of real difficulty.

Last year the "Radio Magazine"

(Paris) published the result of an inquiry conducted by wireless amateurs in an effort to find the best medium for stations to convey their identity to foreign listeners. A system of call signs, unmistakable and simple in character, is urgently needed. So many and varied were the systems proposed that the magazine despaired of arriving at a satisfactory solution to the problem by means of its pages. Whereupon "La Maison de l' Esperanto," an association founded in Paris to facilitate relations for foreigners handicapped by the language barrier, decided to venture on a large-scale experiment. It believed the difficulty as to call-signs could be removed if the announcers, after giving the name of their stations, would add immediately after the name a number, assigned to it as a fixed designation, such numbers to be given in Esperanto.

Thanks to the help of L'Ecole Supérieure des P.T.T., La Maison de l' Esperanto was able to organise a public competition by radio, for which it set aside as prize money the sum of 5,000 French francs.

For two weeks it was announced at intervals that on 28 July a public competition on the reception of Esperanto numerals would be conducted over the air; that from the Eiffel Tower that day a list of twelve names of European stations would be dictated, a numeral in Esperanto to follow each name; that all the competitors needed to do was to send to the Maison de l' Esperanto, in figures, the list of the 12 numbers heard by them. In order to prepare the public for this competition the Maison de l' Esperanto gave a five-minute radio lesson on Esperanto numerals four times in the fortnight.

Here is the result of that experiment. Of the replies received 43% were correct; 32% erred in only one figure. One may, therefore, conclude that the non-Esperantist public can, after a few short preliminary lessons, understand and transcribe figures delivered in Esperanto.

This result was communicated to the French press and to the radio journals, all of which showed much interest in the matter. Surely this success calls for similar experiments in other European countries, with the object of dealing internationally with the undoubted barrier to immediate and unmistakable identification of the multitudinous broadcasting stations now operating throughout the world.

A COMPLETE FILE OF "S.K."?

For bibliographical purposes the Redakcio would greatly appreciate a line from any reader of "La Suda Kruco" who possesses a complete file of the paper from No. 1. Is there such a one? Thank you!

LA NUNA KRIZO ĈE LA SUDA KRUCO.

Voĉo el Sidnejo.

Skribas s-ro F. T. Simon: Denove grava financa krizo endangerigas ekzistadon de nia eta Suda Kruco. Kio nome putras ĉe nia Aŭstralia Esperantujo, ke eĉ ne tiel malgranda, relative facile "produktebla" gazeto povas daŭrigi sian bonfaran? Simple, neagemo de legantoj!

En niaj manoj kuŝas bonega inform-kaj reklamilo—gazeto kiu utilas multcele en kaj ekster ĉi tiu vasta, potenca lando, sed ŝajne oni tion ne pripensas. Konsideru kiamaniere la modesta, 8-paĝa, sola Esperanta ĵurnalo kunligas diversajn grupojn en Aŭstralio kaj Nov-Zelando; konsideru kiamaniere novaĵo atingas legantojn pri lokaj aferoj same interesaj por ni kiel pli poste alvenantaj Eŭropaj sciindaĵoj; konsideru kiamaniere ni informas la Esp-istaron tutmonde pri niaj laŭeblaj faroj; konsideru kiamaniere ni interesas la eksteran mondon pri nia alloga kontinento; konsideru centon da aliaj kaŭzoj, kiuj devus igi nin elpuŝi krion, "La Suda Kruco devas ne malaperi!" Vekiĝu kaj subtenu kion vi nun havas!

Kelkiuj diras, ke estas jam tro da Esp. gazetoj. Tute ne, gesinjoroj, tiuj kiuj ekzistas jam montris sian taŭgecon kaj valoron. La Suda Kruco ekzistas jam naŭ jarojn kaj estas konata en Esp. rondoj ĉie. Verdire ĝi ne rolas grandĵurnale, sed estas sufiĉe grava por meriti daŭrigon. Ĝi donas fortecon al la movado, kaj ja pli ol senhavan enterigon ĝi indas.

Ĉe ni aŭstralianoj kaj nov-zelandonoj sole restas solvo de nuna krizo. Ĉu vi nur disponas je kvar ŝilingetoj kaj duono unu fojon en ĉiu jaro? Ĉu vi povas tion pagi akurate? Ĉu vi povas instigi aliajn interesitojn (ankaŭ ne-esperantistojn) aboni por tiel malgranda sumo? Se tio estas malfacila..... finfine ni lasu La Suda Kruco pere, se ne, vekigu por streĉi vian eblon!

Flamiĝu en ĉi tiu tempo de bezono, disaŭdigu urĝan neceson helpi, rekomendu en via grupo ke ĉiu alestanto fariĝu abonanta, faru ion ajn, sed nepre sen tempoperdo!

(La redakcio danke ricevas promeson de s-ro Simon garantii du funtojn jare ĝis la krizo estos forpasinta).

GRATULON!

Ni ĝojkore gratulas al Melburnanoj f-ino Hilda Dawes, s-roj Norman Perkins kaj A. Walford pro sukceso ĉe la diploma ekzameno de BEA.

LA SUFIKSO -IG.

La sufikso -ig estas ofte uzata ne-logike. Multfoje oni vidas "sonorigi, interesigi, terurigi, lokigi, konvinkigi, limigi, ĉagrenigi, finigi" anstataŭ la korektaj "sonori" (Ekz. 34), interesi, teruri (Marta 20/8, Ps. 27/1), loki (Marta 34/13), kolori (Rab. de Bah. 33/5), konvinki, limi (Marta 124/3, 153/9), ĉagreni, fini, ĉar ĉi tiuj verboj estas transitivaj. Estas vere ke ifoje en la fruaj verkoj de Zamenhof oni trovas "kolorigi," "limigi," tamen poste li uzadis la plibonajn (laŭ principo de sufiĉo) formojn sen -ig.

Oni povas transitive verbigi substantivajn radikojn per simpla ŝanĝo de fina O en I, kiel ĉe "koloro" (kolori), "krono" (kroni), "broso" (brosi); tial ni legas "brunruĝe koloritaj seĝoj" (Rab. de Bah. 33/5). Estas domage ke ĉe Eliro xxv, 5, kie Zamenhof skribis "ruĝe koloritaj" la Bibli-reviziantoj ŝanĝis ĝin en "ruĝe kolorigitaj."

Oni povas transitive verbigi adjektivajn radikojn per uzo de -ig jenmaniere:—"bela" (beligi), "riĉa" (riĉigi).

QUERY CORNER.

Under this head are invited questions on Esperanto history, language and literature.

St. in O.—"Malpezkora" is clear and therefore good Esp-o. At the 5th Congress Zamenhof said "Kun koro iom peza." Compare "facilkora."

Banto.—"Lingvaj Respondoj" (57) informs us that "certa" has also the sense of "iu difinita," as in German, Russian, Polish and other tongues.

Pedanto.—"Suvreno" is the golden coin worth £1. Up to now "pundo" has been only rarely used, although it appears in "The Edinburgh Pocket Dict.," without authority.

B. in To.—The adding of -e to such adverbs in no way changes the meaning, and is only a point of personal style, adopted perhaps for rhythm or euphony.

Memkonu.—To translate "I know thyself." "Konu vin mem," "Tre konu vin mem," or "Elkonu vin mem." See Kabe's "Vortaro," "Laŭ Sokrato la memkono estas la plej malfacila afero."

Ajnulo.—"Ajn" seems superfluous after "ĉiu," except possibly to accent "ĉiu." We think you would search

in vain Zamenhof's works for an example.

Memoro in E.—It is claimed that the first monument in a foreign country to a living man is that to Zamenhof in Franzenbad (Czecho-slovakia) 31 May, 1914.

Pom in T.—It is unnecessary to apply rigidly the rules of grammar when forming compounds, unless an ambiguity can arise by not doing so. One says "urbodomo," "pulsobato," not "urbadomo," "pulsabato," etc. Zam. wrote "unuenaskito" (Eliro 11/5), a noun formed by changing the final letter of "unuenaskita" (Eliro 4,22/23).

Jes. in Bm.—A "romano" is a novel in the English sense of the word. A "novelo" is a short fictitious story. "Stuffy," aermanka (Marta 76/23), premaera (118/18).

AGENTS FOR S.K. WANTED!

The Redakcio would gladly hear from any willing to act as agents for La Suda Krucio in all places where Esp. societies are found. Such practical well-wishers, having received the number of copies asked for, would have the opportunity of prompting sales of our gazette at the meetings, either by disposing of single copies or enrolling new subscribers. This would be a highly valued aid at the present juncture, and would go far, perhaps, to stabilise our position. Antaŭdankon!

RADJO KAJ ESPERANTO.

Esp-istoj sentas en si kontenton pro tio ke finfine prosperis al s-ro R. Rawson jam ricevadi preferatan hortempon sur la disaŭdiga programo de 3LO, nome, unu sabaton en ĉiu monato, je la 7.45a vespere. Notu pri 12a de aprilo kaj 10a de majo. La misordigo akompananta la pasintjaran ŝanĝon de la radjeja direkcio kaŭzis al nia peretera propagandisto iom da ĉagreno, nun feliĉe anstataŭata de konfida espero. En 1928 li respondis al 1,000 leteroj de intereso pri Radjo estas ja grava flanko propaganda.

ĈU VERE?

La plej alta falakvo en la mondo estas la Sutherland-falakvo en Nov-Zelando, kies akvo falas 1900 futojn.

Eĉ la dioj ne povas turni en malvenkon la venkon de tiu homo, kiu jam sin mem venkis.

Volas korespondi kun seriozaj pensantoj tutmondaj.

Curto Baste, Oliva, 28 (Sagrera) Barcelona, Hispanujo.

ON COLLABORATION.

Short Esperanto articles and sketches, original or translated, dealing with some form of Australian activity, or describing some episode or characteristic of this country's varied life, would be thankfully received by the Redakcio for possible publication. The aim is to make the content of "La Suda Krucio" as diversely interesting and representative as possible, which end can be reached only by the willing collaboration of those conscious that success is rigidly conditioned by a common offering of time and travail.

KRONIKO.

Melbourne, Vic.—Frue en la jaro, vizitis la Melb. Esp. Societon s-ro C. Clarke, prezidanto de la Canberra Esp. Societo; f-ino Naomi Byatt el Perth, W.A., kiu donis informon pri la tiea kongreso; kaj el Sidnejo, s-ro Thompson, iama sekretario de la Aust. Esp. Asocio.

En februaro kelkaj Esperantistoj vizitis la Ĉefan Telefonojn, kiu havas la plej grandan mane funkciigatan komutilaron en la mondo. La vizito estis tre interesplena, tiom pli ĉar la gvidanto povis paroli Esperanton.

S-ro P. Hudson daŭrigis sian paroladon pri vojaĝo en Hindujo, kaj montris du tre bele ĉizitajn pletojn el tiu lando. Post restado en Agra li vojaĝis al Delhi kaj survoje vidis amason da pavo. Ĉe Delhi troviĝas vidinda turo konstruita antaŭ 400 jaroj, kaj ekster la urbo oni povas vidi la lokon kie okazis la kronado de Eduardo VII. Poste, s-ro Hudson vizitis Kalka kaj

SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN!

PERCY HOLMES
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

Simla, en la montoj, kien la registaro iras dum somero. Ne estas uzata tie ia veturilo krom la rikshaw. Ankaŭ, sin trovas tie "Wild Flower Hall" kiun posedis la mortinta Lordo Kitchener. La domegon oni nun uzas kiel hotelo.

Wellington, Novzelando.—La loka klubo rekompencis agi por la kuranta jaro la 4an de Feb-o. Kuraĝige estas noti enskribon de sep novaj anoj—kredinde rekta rezulto de la okazo niaurbe de la Unua N.Z. Kongreso. Je la kunveno en la 11a de la sammonato, s-ro W. King (Sek. de N.Z.E.A.) transdonis al la klubo pro s-ro Geo. Gordon donacon de legindaĵo. La kunvenoj klubaj ankoraŭ konsistas el du horoj: unua por instruo, dua por praktikado de Esp-o per programeroj nialingvaj. La N.Z.E.A., kies ĉefsidejo estas en nia urbo, eldonis propagandilon en 3,000 ekzempleroj.

Christchurch, N.Z.—Je la 10a de Feb-o s-ro N. Bell, M.A. denove brodkastis pri Esp-o el radiejo 3YA. La jarkomenca kunveno okazis je la 11a de Feb-o.

Masterton, N.Z. — Post mallonga ĉesigo pro la festa periodo, la ĉi-tiea klubo denove ekfunkciis la 10an de Feb-o per komunakunsido. 16 anoj partoprenis. Akceptinte tre kontentendonan jarraporton oni elektis jenajn oficistojn:—Patrono, s-ro G. R. Sykes, M.P.; prez., s-ro Johns; vic-prez., s-ino McNab; sekretario, s-ino L. Payne (8 Bruce Street); instruanto, s-ro A. Dewar. Dum la jaro la klubo kunvenos ĉiulunde je la 7.30a horo.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A., sekretario, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E.10., Melb.)

TRADUKO 6

MALMULTE KONATA INDUSTRIO (daŭrigata)

Tiuj en la nombro de ĝis tricent kvindek iras la insuletojn ĉirkaŭ la unua semajno en Marto, ĉar kontraŭleĝe estas loĝi sur ili aŭ viziti ilin esceptinte en la birdkaptada sezonon.

La Maorioj ekloĝas, ĉiu sur sia difinita insulo, ekipinte (2) sin por trimonata izoleco. La "domoj" preskaŭ ne meritas tiun nomon, ĉar la plimulto el ili estas "whares" kaj rapide konstruitaj barakaĉoj, tamen sufiĉe fortaj por ŝirmi la loĝantojn kontraŭ la pli rigora vetero.

La birdkaptada sezono estas el du partoj, kies unua parto komenciĝas la unuan tagon de Aprilo, en kiu dato la Maorioj komencas elfosi la birdidojn el iliaj kavernetoj en la tero. De ĉirkaŭ la dudek-kvina ĝis la dudek-oka de Aprilo ili ŝtopas ĉiujn kavernetojn bezonantajn (3) atenton por konservi ilin por la sekvanta sezono pro tio, ke la birdoj ne volas reveni al difektitaj kavernetoj. Nesama estas la metodo kapti birdojn en la dua parto de la sezono. Jam ĝis (4) tiam la junaj birdoj sufiĉe kreskis por iri el la (5) kavernetoj kaj etendi la flugilojn. La Maorioj en noktoj uzas torĉojn por allogi la birdojn, kiujn tiam ili senpene kaptas kaj mortigas. Estas diversaj manieroj por mortigi la birdojn, sed ordinare la indiĝenoj ekbatas ilin per bastono aŭ eĉ mordas la kolon. La kaptado ĉesas la tridekan (6) de Aprilo.

La moro de la "mutton-birds" estas stranga. En la lastaj tagoj de Septembro ĉiuj vizitas la insuletojn kaj purigas la kavernetojn por la venonta (3) sezono. Poste ili revenas por demeti la ovojn, nur po (7) unu por ĉiu birdo. La ido elkoviĝas ĉirkaŭ kristnasko, kaj tiam la gepatroj komencas serĉi manĝaĵon por ĝi. Fine la ido fariĝas bulo de graso, kiu estas sufiĉa nutraĵo por subteni la vivon ĝis la birdido maturiĝas kaj povos zorgi pri si. Tiam la gepatroj foriras al lokoj sur la okcidenta bordo de Atlantika Oceano (8). La junaj birdoj ne povas sekvi ilin ĝis la tria semajno en Majo. Rimarkinde estas, ke la nekaptitaj (3) junaj birdoj povas realiĝi al la pliaĝaj, kiuj foriris el la insuletoj antaŭ ol ili. Kiam la birdoj vizitas la insuletojn en la sekvanta sezono la junaj birdoj alvenas antaŭ ol la pliaĝaj, kio montras, ke ili posedas seneraran instinkton pri loko kaj direkto. Preskaŭ en ĉiu sezono la birdoj reiras al la samaj kaver-

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas de li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

netoj. La Maorioj, broginte (2) la kaptitajn birdidojn, senpene ilin senlanugigas (9) kaj poste salas (9) kaj metas (9) en sakojn el mara vegetaĵo po dek ĝis cent birdidoj en sako. La nombro en sako iagrade dependas de la stato de la birdoj; mezgranda sako enhavas ĉirkaŭ kvardek ĝis kvardek kvin. —(FINO)

NOTARO 6.

1. Preseraro. Traduko 4, L22; post "tridek" enskribu "kvin."—2. Adverba participo. Cox 211.c.—3. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—4. "jam ĝis tiam" estas la ekvivalento de "by then." Kp. "mi jam ĝis nun (by now) trovus tiun, kiu malaperis" (Mart. 160/30). Kp. ankaŭ Ham. 118/29.—5. "la" ofte estas uzata anstataŭ poseda pronomo, kiam pro la kunteksto la senco estas klara. Ekz. 5. Cox 100.—6 "po" ne havas la signifon de la Angla "per" sed de "at the rate of." Ekz. 14/15, 14/16.—7. aŭ "je la trideka." Cox 68 (3b).—8. Mi pensas, ke tiu diro de la aŭtoro estas erara.—9. Rimarku la uzon de aktiva anstataŭ pasiva formo por eviti kunmetitan verbtendon. Notaro 1/4.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas al la jenaj fide-luloj:—F. Simon, 5/-, junio, '30 kaj donaco 15/-; C. Adcock, 5/-, marto, '31; O. Behncken, 5/-, feb., '31; s-ro Archer, 4/6, feb., '31; W. Holloway, 4/6, feb., '31; f-ino L. Saw (donaco) 10/-; f-ino M. Bush, 4/6, feb., '31.

POINTS IN THE ADVANCE.

Since last issue we have learned—

That the "Anglo-Belgian Trade Journal" now publishes from time to time articles in Esperanto.

That M. Leon Berard, an ex-minister of Public Instruction in France, who was celebrated for his famous interdiction of Esperanto in French schools, has confessed his conversion to our language.

That the Ministry of Public Instruction in Greece has authorised the teaching of Esperanto in secondary schools.

That the Soviet Esperanto-Union has printed 30,000 Esperanto text-books and 20,000 dictionaries preparatory to its winter course.

That in Graz (Styria), Esperanto is now taught in the chief schools. Some 300 pupils attend the courses.

That the director of The International Labor Office, Mr. A. Thomas, informed a questioner that he was wholly favorable to Esperanto and that

the results attained by the use of that tongue at the Office were satisfactory.

That the Austrian Ministry of Traffic and Commerce has decided to print again its Esperanto prospectus.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.